

La Suda Kruco

*Oficiala Organo de la Australazia
Esperanto-Asocio.*

Redakcio-Administracio:

BOX 1367, ELIZABETH STREET P.O., MELBOURNE
(AUSTRALIO).

N-ro 32. Melburno (Melbourne), Australio. 10 Februaro, 1923. Price 4d.

The Australasian Esperanto Association.

AFFILIATED GROUPS.

- Belgrave.**—(E. Grupo). Fino S. Giles, "Warawing," South Belgrave.
- Brisbane.**—E. Klub, Sro. Sycamore, "Bonvenu," O'Mara St., Lutwyche, Brisbane.
- Hobart.**—Esperanto Society, Sro. E. F. Heritage, 35 Risdon St., Newtown, Hobart.
- Melbourne.**—Hardware Chambers, 350 Little Collins St., Friday, 8 p.m. Rationalista Esperanta Grupo, Temperance Hall, Melbourne.
- Mont Albert.**—Sek., Fino B. K. Blythe 10 Victoria Ave., Surrey Hills.
- Northcote.**—(La Verda Stelo). Sek., Sro. G. Delaney, 16 Gordon Grove, Northcote.
- Oakleigh.**—(Iru Antauen). Sek., Sino. R. Bigelow, Kangaroo Rd., Oakleigh.
- Rabaul.**—(Nov. Guinea, E. Grupo). Sro. F. Simon, Rabaul, New Guinea.
- Sandringham.**—(Marborda Grupo), Fino M. Hollow, "Porteath," Bamfield St., Sandringham.
- S. Australia.**—Esperanto Society, Sro. W. L. Waterman, 20 Henley St., Torrensville, S.A.
- Sydney.**—Esperanto Society, Sro. L. Fosto, "Edna," Clissold Parade, Campsie, N.S.W.
- Townsville.**—Esperanto Society, Sro. Chas. Price, School Sts, Stanley St., Townsville.
- W. Australia.**—(Nigra Cigna Grupo), Fino F. Cherrett, 46 Leonard St., Victoria Park, Perth, W.A.
- Whangarei, N.Z.**—Sro. W. H. King, P.O., Whangarei Nth., Auckland, N.Z.

Chocolate Bowl Sweets.

Made Specially for "My Lady's" delectation. Available in choice and exclusive varieties daintily packed. Phone your next order, or write for particulars of these "Made to-day" Sweets. We supply quantities to suit individual requirements.

ASK FOR

Chocolate Bowl Sweets at Confectioners—All Suburbs.

Esperanta entrepreno—Deziras korespondi kun samfakanoj en Usono, Svisujo, Francujo, Rusujo, kaj Austrujo, pri farado de chokoladaj sukerajhoj.

**18 CENTREWAY, COLLINS STREET
MELBOURNE.**

Telephone: Central 2210.

Universal Esperanto Association.

Founded, 1908.

Objects:

To spread the use of the international help language Esperanto.

To facilitate communication between the peoples without distinction of race, nationality, religion or language.

To institute international services available by everyone whose intellec-

tual and material interests extend beyond the limits of their own country

Delegates in every country.

Membership, 5/- per annum, or with the monthly magazine "Esperanto," 12s. 6d.

Subscriptions for 1923 are now payable to—

G. W. BALLARD (Delegate for Melbourne and Chief Delegate for Australia),
27 Lansdowne Road, East St. Kilda, Victoria.

AL NIAJ SUBTENANTOJ.

Komence de la nova jaro multaj abonoj fariĝis pageblaj. Multaj ricevintoj ankoraŭ ne pagis post la unua jaro. Ni bezonas vian abonpagon, reklamojn, novaĵon kaj plenan subtenon.

Gis la 1a de februaro ni ricevis la jenajn sumojn: — E. J. Cox (donaco), 5/-; G. Williamson, 4/6; Grupo "Espero" (donaco), £2/2/-; L. Glynn, 1/9; E. A. Turner, 7/6; M. R. Cederman, 5/-; C. Wells, 10/-.

PAGITAJ ANONCOJ.

Esperantistaj gekursanoj en Dotnava meza agrikulturlernejo, deziras korespondadi per i.p.k. kun gesamideanoj en la tuta mondo. J. Vilutis, Ukio Mokykla, Dotnava, Litovujo.

Kontraŭ 5 dolaroj mi sendos kompletan serion de kronadaj poŝtmarkoj eldonitaj okaze de la kronado de la rumana reĝo. Sendu en rekomendita letero. Adelbert Toader, Diriginte poŝtei, TEIUS, 2, Romanujo.

La Suda Kruco

Oficiala Organo de la Australazia Esperanto-Asocio.

Redakcio-Administracio:

Box 1367, Elizabeth-str: P.O.,
Melbourne (Aŭstralio).

Abono (por dek du numeroj):

Aŭstralio: 4 ŝilingoj kaj 6 pencoj.
Ekster Aŭstralio: 5 ŝilingoj,
aŭ 24 respondkuponoj.

Unu numero: 4 pencoj aŭ 2 respondkuponoj.

Ancnoĵ: Por 3 Linioj: 1 ŝilingo aŭ 5 respondkuponoj.

N-ro 32. Melburno (Melbourne), Australio. 10 Februaro, 1923.

THE SYDNEY CONGRESS.

Congress arrangements are proceeding smoothly, and the Committee have great hopes of a huge success. Members' cards issued to date number 39. The following is the provisional programme, which may be added to later on:—

Friday, March 30.—Arrival of Delegates.

Saturday, March 31.—Visit to Zoological Gardens.

Sunday, April 1.—Afternoon. Members to be entertained in Botanical Gardens.

In the evenings of these days, private arrangements to be made for trips to Manly, Watson's Bay, and other resorts.

Monday, April 2.—Harbour excursion in Government launch.

Monday Evening.—Examinations for B.E.A. diploma, in W.E.A. club-room, at 8 p.m.

Those intending to present themselves for examination should send their names at once to S-ro F. V. Taylor, 131 Alice Street, Newtown, N.S.W.

Tuesday, April 3.—Official opening of Congress in Assembly Hall, Education Department, Bridge Street, at 10 a.m., by Rev. M. Scott Fletcher, M.A., D.D. Afternoon: Business session. Evening: Concert, King's Hall.

Wednesday, April 4.—Morning: Business session. Afternoon: Public welcome, Town Hall. Evening: Members entertained at W.E.A. club-room.

Thursday, April 5.—Evening: Lecture at University, under the auspices of Workers' Educational Association.

NIA DUA AEROPOSHTO.

La unua aeropoŝto en Aŭstralio estis priskribita en la Suda Kruco, juna numero, paĝo 90. La servo akurate funkcias, kun granda sukceso kaj sen akcidento. Ĉi tiu servo estas laŭ la marbordo en Okcidenta Aŭstralio. Nun dua servo komenciĝis en Kvinslando, de la sudo en morda direkto, kaj kvar cent ĝis kvin cent mejloj malproksimaj de la marbordo. La aeroplano foriras el Charleville ĉiun ĵaŭdon kaj portas leterojn por Tambo, Blackall, Longreach, Winton, Mackinlay, kaj Cloncurry, kien oni alvenas vendradon. Cloncurry estas proksimume 500 mejloj de la orienta marbordo sed nur ducent mejloj suden de la Carpenteria golfo. La reveturo estas farata de dimanĉo ĝis lundo. La servo estas tre populara kaj iufoje pasaĝero estas portata. Ĉiu poŝtaĵo devas surhavi la surskribon, "Por aera portado." La tarifo estas minimume kvin pencoj por letero ĝis unu unco..

RECENZOJ.

TRA LA MONDO, Internacia legolibro, Kolektita kaj prilaborita de Paul Bennemann. Dua parto: Por progresintoj. Kartonita eldono M. 189. 1922. 144 paĝoj kaj muzikaldono. Ferdinand Hirt & Sohn, Salomonstrasse, Leipzig. Havebla ĉe la Aŭstralazia Esperanto-Asocio, 2ŝ Od.

La unua parto de ĉi tiu verko vekis grandan intereson inter ĉiuj Esperantistoj, pro sia eminenta taŭgeco kiel legolibro montranta al lernantoj multajn stilojn de la lingvo. Nun oni eldonas por progresintoj la duan parton, en kiu troviĝas sentencoj de famaj homoj de multaj landoj kaj tempoj, poezio diverslanda, romanetoj, sciencakoj, anekdotoj kaj kvar komponaĵoj. Bedaŭrinde en la unua frazo de la antaŭparolo oni erare uzis la ĝenantan vorton "si," sed cetere la lingvo estas korekte bonstila, samtempe plezuro kaj modelo por samideanoj.

B.C.B.

La mirinda historio de PETRO SCHLEMIHL, el la germana originalo de Adelberto de Chamisso tradukis Eugen Wuster. Kartonita eldono M. 105. 1922. 82 paĝoj. Ferdinand Hirt & Sohn, Leipzig. Havebla ĉe la Aŭstralazia Esperanto-Asocio, 1ŝ 3d.

Ĉi tiu genia verko de Chamisso, kvankam eĉ nun bone konata tra la tutmondo, estas kore bonvena en ĝia esperanta formo kaj aldonas ankoraŭ alian al la multaj ĉarmaj fantaziaĵoj, kiuj, sub la ŝajno de mistero kaj mirindaĵo, kaŝas altvalorajn vivadmonojn.

Ĉi tiu traduko estas tre bonstila, facile legebla kaj indas la legadon de ĉiu Esperantisto. Tamen, mi ne rekonas la vortojn "longagamba" (pĝ. 10, eble "longakrura"); "hororetiga" (pĝ. 20, eble "terura"); "profunde survoŝis" (pĝ. 26, eble "enprofundiĝis en") kiel fundamentajn. Sur paĝoj 30 kaj 33 troviĝas "l'o" kaj "l'on." Ĉu "io" "ion" estas skribitaj? La frazo, "mi opinias, ke mi povintus esti felica," oni ordinare skribus—" . . . povus esti felica." Sur pĝ. 79 troviĝas "las," tiu eble estas presfuŝaĵo por "lasas." Ĉi tiuj makuletoj sendube estos forigitaj en estontaj eldonoj, kaj eĉ en la nuna ne tro ĝenas la leganton.

C.W.B.

LA NIGRA GALERO, de Wilhelm Raabe. El la germana originalo tra-

dukis d-ro F. Wicke. Kartonita eldono M. 40. 1922. 64 paĝoj. Ferdinand Hirt & Sohn, Salomonstrasse, Leipzig. Havebla ĉe la Aŭstralazia Esperanto-Asocio, 1ŝ 3d.

Jen ni havas rakonton, kiun ĉiu, nur komencinte ĝin, avida legos ĝis la fino. La historio temas la bataladon inter Hispanujo kaj Nederlando kaj la majstra rakontarto de Raabe revivigas kvazaŭ antaŭ niaj okuloj la heroajn marsoldatojn de tiu tempo. Se ĉiuj la rakontoj de Raabe similas la Nigran Galeron la Esperantistoj diros, same kiel Oliver Twist—"Donn plu."

Kvankam noto diras, ke ĉiuj ne esperantaj vortoj estas prese distingitaj per kursivaj literoj, mi ne sukcesis trovi en la esperanta vortaro la vorton "geŭzo." "Marstrato" estas uzita en senco "markolo." Cetere la lingvaĵo estas tute laŭfundamente kaj facile kaj plezure legebla. Mi tre malofte legis pli interesan rakonton.

C.W.B.

KROATA LANDA REGISTRARO OFICIALE AKCEPTAS ESPERANTON.

La prezidanto de la Esperanta Societo en Zagreb ricevis la sekvantan oficialan cirkuleron:

Landa Registaro por Kroatujo kaj Slavonio.

Departemento por la Klerigo kaj Konfesioj.

N-o 25.252.
1922.

Por preso en la oficiala organo de le Registaro.

Cirkulero

de la landa registaro por Kroatujo kaj Slavonio, departemento por la Klerigo kaj Konfesioj de 25-a de oktobro 1922, n-o 25.252, direktita al tuta instruistaro de Kroatujo kaj Slavonio, per kiuj ili estas sciigataj pri la Manifesto al la tutmonda instruistaro, kiun eldonis Internacia Konferenco de Instruistoj en Geneve.

Sekvas la tuta teksto de la manifesto, akceptita en la nomita konferenco de 20, aprilo 1922.

En Zagrebo, la 25-an de oktobro 1922.

Por la landa Vic-reĝo.

(—) D-ro Stjepan Bosanac
Reĝa Landa Lerneja Inspektoro.

GRANDA PROPAGANDA

PAROLADO PER RADITELEFONO.

Per aranĝo kun unu el la grandaj radi-firmoj en New York, U.S.A., nia samideano s-ro. J. D. Sayers parolis 15 minutojn dum unu vespero per la radiotelefono pri kaj en Esperanto.

Tiu parolado estis unu ero de la ordinara programo, kiu estis presata entute en la tagĵurnaloj.

Estas signifoplene por Esperanta propagando, ke en New York 400,000 personoj posedas radi-ricervajn aparatojn, kaj la estro de la radi-firmo certigis s-ron Sayers, ke laŭ modera kalkulo minimume 50,000 personoj aŭskultis lian propagandan paroladon.

Tio certe estas la unua propaganda parolado pri Esperanto per radia telefono kaj la aŭdintaro estis la plej multnombra en la historio de nia movado. La raditelefona firmo estas "The Westinghouse Electric Co." S-ro J. D. Sayers estas en la stabo de la bonkonata tagĵurnalo "New York Evening Post."

"Esperanto Triumfonta."

TRA LA ESPERANTA MONDO.

— Fako meditinda kaj grava en nia unua movado, estas la disvolviĝo de la faka movado, permesanta, en diversaj kondiĉoj, pli rapidan penetradon de Esperanto en la korporacioj.

Lastatempe, la polica movado, iom dorminta post la milito, etendiĝis sur preskaŭ ĉiuj landoj, eĉ en Japanujo. Sufiĉas legi "La Policiston" kun ĝia detala kroniko, por konvinkigi pri la rapidaj progresoj. En 1923 okazos en Madrid, kun registara helpo, la unua internacia esperanta policista kongreso. Alia, laŭ la graveco, estas la rom-katolika movado, precipe disvastigita en germanlingvaj landoj kaj, eble, pli prospera, se oni estus evitinta disputojn inter la I. K. kaj la E. U. I. K. Ni konstata la aprobojn de la alta eklezia estraro kaj la laboron de naciaj katolikaj asocioj en Germanujo, Aŭstrujo kaj Nederlando.

La poŝtista movado, grupiganta ĉirkaŭ *Ildepo*, prosperas. En Germanujo, Nederlando, Brazilujo, Ĉeĥo-Slovakujo estis faritaj eĉ oficialaj enketoj pri Esperanto inter la poŝtovicistaro. En Germanujo ĝi kolektis 864 adresojn, en Nederlando 75, en Usono 27. En Francujo la nacia Esperanta asocio,

sub la gvido de senlaca s-ro di Rienzi, laboras, traborante la indiferecon. En Jugo-Slavujo (Bosnio-Herzegovino), la nombro de kursoj kaj la simpatio de la faka gazetaro estas citinda. La faka kongreso okazos ankaŭ eble en Madrid.

Ni ne forgesu la komercistan movadon, kiu dum la XIV-a estis starigita sur firma bazo kaj havos, sendube, regule aperantan organon. La komerco estas unu el la branĉoj per kiuj Esperanto plej facile penetros en la praktikon.

La laborista movado, kunligita kun aparta klasa socia idealo, estas pro tio separita de la ĝenerala movado. La eldono de la "Sennacieca Revuo" kaj de fakaj organoj en Germanujo kaj Svedujo, klopodoj ĉe sampolitikaj asocioj, agemaj grupoj kaj kursaro, pravas la rezultojn de la laboro, en ĉi-tiu medio, en kiu niaj lingvaj malamikoj renkontas simpatian.

El aliaj movadoj, notu la kuracistan, tiel fortan antaŭ la milito, kiu baldaŭ havos sian presorganon, la sciencan, kiu ellaboras nun la tiel necesajn sciencajn vortarojn kaj la teozofian. Ĉu oni povas konkludi pri la ne neceso de la ĝenerala movado. La prospereco de la faka movado estas nur rezulto de daŭra ĝenerala propagando, kiu ankoraŭ ne estas finita. Ni ne povas ankoraŭ forlasi unu kampon por transporti la agadon en alian. Esperanto, estante neŭtrala, devas esti ĉie.

— "France-Esperanto."

GAZETAJ SHANGHOJ.

La Internacia Komerca Revuo, apenaŭ komencinta sian trian jaron de ekzistado, nun ĉesis aperi. Sekvas ĝin nova monata gazeto, kiu elektis la formaton de ĵurnalo: "Internacia Komerco." Adreso por senpaga specimeno numero: "Internacia Komerco," en Lausanne (Svislando), St. Luce, Petit Chêne.

Dia Regno, oficiala organo de la Kristana Esperantista Ligo restariĝis. Ĝi aperas en la malnova formato. La kotizo por la K. E. L. estas samtempe la abonprezo, kiun pagas la neanoj de K. E. L. Por gajni multajn Kristanajn legantojn oni akceptas libervolajn abonpagojn, proksimume valorantajn unu svisan frankon. Oni adresu. P. Hubner, Bergstrato 1a Quedlinburg (Germanujo).

LA AGLO KAJ LA SUNO.

de ANTONI WYSLOUCH.

Sur alta, sovaĝa, blanketa roko, ĉe la rando de l' egiptaj dezertoj, sidis aglo, — kaj meditis. . . .

Ĉirkaŭe rokoj mirinde formitaj, nudaj, sen eĉ iometa verdaĵo, musko aŭ herbo, lumantaj per malbonsigna malvivula paleco, — tie pli malproksime la ora rubando de Nilo, brilanta diverskoloro, — kaj aro da nemovigemaj palmoj, kvazaŭ ŝtonigintaj, dronantaj en la suno, — kaj de la alia flanko la dezerto, grandega, senluma kiel maro, kun grandaj grandiozaj ondegoj de flava sablo, malviva, silentanta per ia mirinda trankvilo, kvazaŭ ĝi kaŝus en si sekretojn terurajn, malgaja, kiel homa koro, en kiu komplotas plej sanktaj sentoj kaj en kiu regas malpleno kaj mallumo. . . .

Sidadis la aglo, — kaj meditis. . . .

Li sendis la rigardojn ĉirkaŭen, — jen al la Nilaj akvoj, kvazaŭ flamantaj sub la influo de l' suno, — jen al la palmoj, dronigantaj, kun trankvilo kaj nemovigema raviteco, siajn foliojn en la radioj de l' suno, — jen al la blankaj rokoj per lumo surversataj, — jen al la senlimaj sabloj de l' dezerto, silentantaj, per eterna trankvilo.

Kaj lia rigardo timema, netrankvila strange kontrastis tiun solenan impreson de trankvilo kaj silento, regantan ĉirkaŭe. . . .

Io lin turmentis, lian koron aglan — li suferis.

Naskiĝinte tie malproksime, sub la neĝo de l' Alpoj suproj, sur la ĉielaltaj rokoj granitaj, — estante ankoraŭ aglido li jam ekamis la sunon. . . .

Per flugiloj ankoraŭ malfortaj, sed kun fortostreĉo kaj penego li grimpis pli kaj pli alten, por pliproksimiĝi al la suno sen malhelpo kaj baro. . . .

Kiam ĝi brilis hele, inter la klaraj bluaĵoj, la aglido ekĝojis gaje batante per siaj flugiloj kaj ravite suprenrigardis, kie flamis la amata disko ora kaj al la klaraj puregaj akvoj de l' montaj lagoj, en kiuj sin spegulis la suno, — kaj per sia beko trinketis la roserojn, kiuj reflektis la adoratan astron — kaj bone li sentis sin. . . .

Sed kiam la Alpa ventego ekbruas sur la suproj, kaj de l' okcidento levigis la nuboj sin volvante kaj forprenis la sunon-amatinon kaj esploris per densa pluvokaj kvazaŭ per funebra

krepo ĉion vualis, malĝojis kaj ploris la aglida koro.

Kaj kreskis la aglido, kaj plifortigis liaj flugiloj — kaj per kuraĝa flugo li konstante plu en flugis super la plej supraj pintoj kaj atente rigardis la sunon, kaj ĝojis pro ĝi, kiam ĝi lumis; sed kiam li ĝin ne vidis, li tiom pli malĝojis.

Kaj li eksciis, ke jen sude estas lando, kiu kiel li ekamis la sunon, lando, kie la suno brilas konstante inter la bluegaj lazuroj, kie nebulo ĝin kovras nenie, kie regas helo, kie estas senĉese serena vetero. . . .

Li forlasis do siajn hejmajn suprojn, ĉielaltajn, granitajn rokojn, kaj la verdajn ridetantajn valojn Alpajn kaj brilantajn meditemajn akvojn montajn de la lagoj, kaj forflugis al la lando de l' suno. . . .

Per forfa flugo kun tuta fervoro de sia juna koro li antaŭenrapidis.

Li vidis sub si belegajn kastelojn, grandajn kaj homoplenajn urbojn — kaj grandegajn verdajn ebenaĵojn kaj arbarojn el cipresoj kaj pinoj — jen denove ondiĝemajn akvojn de l' maro, ŝaŭmantajn, bruegantajn, timigajn, sed ĉio ĉi ne interesis lin, — li flugis al la lando, kie li ĝuos la sunon-amatinon, pli multe ol antaŭe — sen interrompo. . . .

Kaj fine li ekvidis la palmajn boskojn kaj trankvilajn, solenajn akvojn de Nilo, kaj la senbordan maron el flavaj sabloj, kaj la ŝtonegojn de l' piramidoj kvazaŭ gardostarantaj Egipton. . . .

Lacigita, sed plena de ĝojo li sidigis sur roko, — li trinkis la lumon kaj la sunon per la okuloj kaj per ĉiuj fibroj de sia korpo, li kvazaŭ enigadis, enprofundiĝadis en la sunon. . . .

Sed nelonge daŭris la trankvilo kaj feliĉo. . . . Sur la klara ĉielo estis eĉ ne unu nebuleto, la suno brilis hele, per lumo kaj varmo, kaj per ili superverŝis ĉion. . . .

Sed vesperiĝis, — la suno malleviĝis al la tero, superverŝis ĝin per la lastaj faskoj de lumo, ĵetis mil kolorojn sur Nilon, per ora ruĝo koloris la arbarojn de l' palmoj kaj la dezerton kaj la ĉielon, — kaj dronis en la melankoliaj sabloj de Saharo. . . .

La nokto ŝajnis al li pli longa ol ĝis nun, — ĉi tie li sentis sin pli proksima al la suno, do la disiĝo ŝajnis al li pli kruela, pli malfacila, pli neeltenebla, —

kaj li insultis la stelojn tremantajn, ekbrilantajn timeme sur la ĉielo, kvazaŭ ili volis lin konsoli post perdo de la suno kaj la luno, kiu per sia brilo pala vane ĝin volis anstataŭi.

Mateniĝis.

Per ĝojiga hela lumo denove pleniĝis ekmurmuris kontentigite la pal-ekridetis gaje eĉ la dezerto—la vento ekmurmuris ĝojkanton:—sed la agla koro restis plena de mal-ĝojoj,—li jam sciis, ke la suno denove malaperos por li, kaj, kiam denove resperiĝos, li certe estos disigata de sia amatino.

Kaj li deziregis la sunon, ĉirde kaj li ĝi—li nek povis nek volis vivi sen la suno. . . .

Suprenleviĝis la suno ĝis la mezo de ĉielo dissendante teren varmegajn radiojn. Kaŝis sin homoj en la domoj, ĉar ili ne povis elteni la varmegon. . . . Sed la aglo ne serĉis la ombron. . . .

Ekkaptis lin penso kuraĝa, nekontraŭstarebla, — li ĉirkaŭrigardis kaj poste en la suno li dronigis la pupilojn plenajn de amo, avido kaj ardo — kaj disetendante siajn larĝajn flugilojn per forta eksvingo li ekflugis supren al la suno. . . .

Al li sufiĉis nek la lumo, nek la varmo nek la suna lando,—li celis la sunon mem. . . .

Kaj li flugis kvazaŭ freneza. . . .

Malproksime kaj profunde sub li restis la rokaĵoj suproj de la rando dezerta kaj la verdaj malvarmigaj arbaroj palmaj kaj la obtuze murmuranta Nilo kaj la sabloj flavaj—kaj aro da kriaĵoj vulturoj de l' dezerto ĉirkaŭfluganta super la tero—sed la suno ne estis pli proksima—kontraŭe ŝajnis al la aglo, ke ĝi malproksimiĝas pli kaj pli, dum li per giganta flugo estis suprenleviĝanta—nur ĝiaj radioj fariĝis pli varmaj, pli brilantaj, kaj al la aglo estis pli kaj pli malfacile spiri.

Tamen li flugis konstante supren.

Malsupre oni jam nenion povis distingi—ĉio estis kuniĝanta, kaj la verdaĵo de la Nilaj bordoĵoj, kaj la palmoj, kaj la arboj, kaj la rokoj kaj la dezertoj—ĉio kunfandiĝis je unu granda blankulo, la aero iĝis pli kaj pli maldensa kaj la suno—pli malproksima—sensange restis la samo.

La aglo sentis, ke li ne povas plu flugi, li streĉis la lastajn fortojn,

apenaŭ movante la flugilojn kaj kun grade pli grandiganta peno li flugpendis en la maldensa aero, sub la fajra disverso de l' radioj brulantaj,—sed obstine li celis antaŭen, li ne volis retiriĝi, ĉar li ne povis vivi sen la suno,—do li flugis. . . .

Pli kaj pli li malfortiĝis—ĉirkaŭe regis sekeco—li ne povis refreŝigi—ekkaptis lin kvazaŭ frenezo, malespera obstino—ju pli li malfortiĝis—des pli li decidis—flugi al la suno. . . .

Ĝis fine la suno neĝankema elbruligis al li la okulojn, la okulojn, per kiuj li la sunon ekamis kaj kiuj ĉiam sin direktis al la suno. . . .

Tamen eĉ nun li turnis la blindajn okulojn al la suno, kvankam li ne plu vidis ĝin, kaj kvankam li perdis la esperon atingi la sunon kaj ĝoji jam pro ĝi—kaj li senĉese flugis, per la lastaj penegoj de siaj flugiloj, per la lastaj fortostreĉoj ne de sia korpo, sed de sia amo. . . .

Ĝis fine liaj blindaj okuloj kovriĝis per sango, ekploris per larmoj sangaj,—kaj la koro krevis superversite per sango. . . .

La aglo malsuprenfalis teren. . . .

Sur la rokoj de l' dezerto li disfrakasis al si sian bruston kaj sangokovrite, kun elbruligitaj okuloj, kun koro elŝirita el la brusto, li falis sur la sablojn de Saharo. . . .

Kaj are flugis al li la vulturoj de l' dezerto. . . .

Longe ili serĉis nutraĵon, do saltante por ĝojo, kun avidaj krioj, ili proksimiĝis al la aglofrenezulo. —

Li altiris al si el sub la rokoj kaj sabloj diversajn rampaĵojn dezertajn,—kaj moralisto, se li preterirus, certe estus dirinta: “frenezulo, kial vi senpripense entreprenis ion, kio superas viajn fortojn.” . . .

Kaj tamen la aglofrenezulo, supoze ke li ankoraŭ povu leviĝi, denove suprenrigardus kaj disetendus la flugilojn por flugado; kaj denove li flugus . . . al la suno, eĉ kun elbruligitaj okuloj—kaj eĉ kun koro disŝirita. . . .

—El la pola lingvo tradukis Salo Grenkamp-Kornfeld, en “Esperanto Triumfonta.”

Fraŭlino—Kion oni deziras komprenigi per “ŝi havas dentojn kiel la stelojn”?

Edzo—Ke ili elvenas kun nokto.

ANKORAU AMU KAJ NE JUGHU.

Jen, Dio, ĉirkaŭ mia korp' la ombroj
de vesper',
Sed sur spirito mia pli profunda
ombro staras;
Ho, Di', la plej amata batis min per
man' de fer',
Kaj kontraŭ mi la vojon al feliĉo forte
baras.

Ho, pikas min la farno ĝis la kor' de
mia kor',
Animo de animo mia tremas en
doloro,
Konfuzo min ja regas, taŭgaj vortoj
flugas for
De mi tordata, Di', en tiu ĉi malluma
liro.

Ho, justa Di', al mi ja donu rajton
venĝi min;
Sur ter' ne estas povo kiu taŭge min
inspiras—
Ho, Dio! kiel preĝas mi, kaj mi ne
aŭdas Vin!
Ĉu Vi en turmentego mia Vin de mi
fortiras?

Ho, rivereto, lulkantanta
Al dormo florojn, herbojn viajn,
Konsilu min vin aŭskultantan—
Ha, vi respondas vortojn miajn—
“Ankoraŭ amu, kaj ne juĝu!”

Ho, nuboj, elstreĉantaj lace
La formojn por ripozo via,
Vigligu, diru kiel pace
Per venĝo batos koro mia—
“Ankoraŭ amu, kaj ne juĝu!”

Ho, ŝtonoj en la rivereto,
El viaj ja malmolaj koroj,
Là venĝon diru laŭ la peto
Farata nun al vi kun ploroj—
“Ankoraŭ amu, kaj ne juĝu!”

Aero, fajro, akvo, tero,
Kaj idoj viaj, min atentu!
Ĉu mi ĝin serĉu en infero?
Konsilu taŭge aŭ silentu—
“Ankoraŭ amu, kaj ne juĝu!”

Ho, tondroj en oreloj miaj,
Elkonscienco kuregantaj,
Silentu! Jam la tonoj viaj
Min venkas, forte min regantaj—
“Ankoraŭ amu, kaj ne juĝu!”

Jen, Dio, ĉirkaŭ mia korp' la ombroj
de vesper',

Sed sur spiriton mian tre helega lumo
venas;
Ho, Di', la plej amata batis min per
man de fer',
Sed, Di', la voĉon Vian mi aŭskultas
kaj komprenas.

Ho, pikas min la farno ĝis la kor' de
mia kor',
Sed, Di', animo mia jam eklernas la
kompaton
Por tiu, kiu de la amaj faroj vagas
for,
Donante por la amikeco nur kruelan
baton.

Ho, justa Di', Vi min rifuzas rajton
venĝi min;
Sur ter' Naturo, voĉ' de Vi, ja bone
min inspiras;
Naturo, kiu ĉiam vole ja obeas Vin.
La bonon sian de neniu iam do
fortiras.

UMANTO.

FLUGFOLIETO.

Se entute—tute! Mi malŝatas la
aferojn pleumatajn nur duone. Ni
demandu nin sincere: Ĉu ni dediĉas
al la lernado de Esperanto la necesan
kvanton je energio, persistado kaj
amo? Mi dubas, ĉu ĉiuj senskrupule
povos respondi: Jes. La plimulto el
la “komencantoj” kaj ankaŭ granda
nombro el la “finintoj” konsideras Es-
peranton kiel sporton, kiel amatorajn
kaj—ili estas pravaj! La tro fervora
instruanto ja diris al ili, ke Esperanto
estas tiel facila, ke eĉ suĉinfanoj povas
lerni ĝin. Kial do penadi? Ĉi tiu
troigo, farata kompreneble bonintence,
en la realeco ekstreme malutilas al nia
afero; ĝi tente instigas al supraĵeco
koncerne la studadon. Certe la Es-
peranta gramatiko estas tre facila;
sed la lingvo konsistas el frazoj. Mal-
graŭ plej facila gramatiko oreloj kaj
lango bezonas longtempan, praktikan
ekzercadon, por povi kompreni kaj
redoni frazojn. Alia afero, ne malpli
grava, estas, ĉu la frazoj distingiĝas
per korekteco; en tio nin helpas la
facileco de la gramatiko. Sed la kom-
prenado kaj parolado per si mem, pos-
tulas ĉiuokaze la saman laborenergion.
preskaŭ sendepende de tio, ĉu la gra-
matiko estas facila aŭ ne. Se ni de-
diĉus al la lernado kaj plena akirado
de Esperanto la saman diligentecon
kaj seriozecon, kiun ni kutime dediĉas

al la lernado de fremdaj, naciaj lingvoj, ni baldaŭ konstatas evidentan progreson en la ĝusta, praktika uzado de nia lingvo. Bedaŭrinde mi konas multajn Esperantistojn, kiuj restas dum sia tuta vivo "komencantoj." Tio ne daŭru! Ni ĉiuj fariĝu "finintoj"! De hodiaŭ ni ekdecidu lerni Esperanton perfekte; ne nur la gramatikon, sed ankaŭ la purecon de l' skriba kaj parola stilo. Tiaokaze la granda publiko fidos al nia afero kaj baldaŭ ĝi venkos. Mi malŝatas la aferojn plenumatajn nur duone. Se entute—tute!

Z.

—“Esperanto Triumfonta.”

AL ESPERANTISTAJ GEINSTRUISTOJ.

La redakta komitato de la fakgazeto pri popoledukado: “Novaj Tempoj,” kiuj vigle propagandas Esperanton en edukista neesperantista mondo per sia nacilingve tradukata dokumentaro kaj novan edukismon de l'esperantistoj, ĵus decidis apirigi kredeble je Pasko 1923 “Adresaron de Tutmondaj Esperantistaj Edukistoj.”

Tiu adresaro estos la plej grava helpilo ebligonta la geinstruistojn internacie kaj efike labori. Ĝojos pri tiu novaĵo ĉiuj, kiuj konscias plene pri la grava tasko plenuminda de geinstruista esperantistaro en la propagando de Esperanto. La triumfon de Esperanto ni certigos per Lernejo, t.e. per helpo de l'edukistoj.

Jam “Novaj Tempoj” kolektis preskaŭ 1000 adresojn de ĉiulandaj gekolegoj. Ni varme petas. 1a la sekretariojn de naciasocietoj de esperantistaj instruistoj sendi al ni sian membroliston. Ni kompensas per sendo senpaga de l'adresaro internacia. 2a la izolitajn gekolegojn, kiuj ankoraŭ ne ricevis la gazeton “Novaj Tempoj” do. kies adreson ni ne konas, komuniki al ni per poŝtkarto aŭ nur presajo sian nomon kaj adreson. Ili ricevos kompenso senpagan ekzempleron de la gazeto. 3a la needukistaj samideanoj, tre interesataj pri la edukista demando, nin same informi. Ni same dankos. Iliaj nomoj estos aparte grupigitaj fine de l'adresaro. Edukistoj rapide respondu nian alvokon! Sin turni al: E. Vittecoq, Sassetot par Bacqueville (Seine Inferieure), Francujo.

KRONIKO.

LILYFIELD, apud Sidnejo, N.S.K.—Nova grupo el dek membroj starigis, kaj filiigos kun la A.E.A.

BRISBANO, Kvinslando.—S-ro. Symore raportas, ke la lokaj anoj pli vigligas. Antaŭ nelonge sociala vespero estis tre sukcesa.

MELBURNO, V.—Ĉe la ĉiusemajna kunveno de Melburnaj anoj de la A.E.A., la 26an de januaro, s-ro. A. S. Lennie, agema instruisto de la ŝtata lernejo en Sale, faris viziton. Nia samideano opinias, ke Esperanto estos tre helpa al infanoj en lernejoj kaj rajtas esti akceptata ĉe nia Universitato.

DE LA LINGVA KOMITATO.

Paris, 5. Nov. 1922.

Kara kolego,

Mi sendas al vi:

1. La rezulton de la voĉdonado de la Lingvaj Komitatoj:

(a) pri landnomoj;

(b) pri la kreado de Akademias korespondantoj.

2. La plenan liston de la nunaj L.-Komitatoj.

VOĈDONADO PRI LANDNOMOJ.

Post raporto de prof. Grosjean-Maupin la Akademio, flankenmetante aliajn proponitajn solvojn, al la demando: “Ĉu konsilinda la simpla fideleco al la Fundamenta kaj tradicia u j?” respondis:

9 jes, 2 ne, 1 duba voĉdono.

Al la demando: “Ĉu vi aprobas la fidelan sintenadon de la Akademio en la landnoma demando?” respondis 87 L.-K-anoj:

74 (2 kun rezervo) jes; 5 ne; 2 dubaj voĉdonoj; 6 sin detenis de voĉdono.

Kun kora saluto via tre fidela

Th. Cart,

prezidanto de la L. K-ato.

INTERNATIONAL LABOUR OFFICE NEWS SERVICE.

The necessity for the protection of emigrants was shown by the Brazilian delegate, who quoted the case of Russian refugees who were sent to Brazil. The majority of these people were printers or machinists, and, on arrival in Brazil, found that there was

no occupation for them, and they had to be "passed on."

The Italian Government has formally confirmed the resolution dealing with unemployment, working mothers, and night work by young people of both sexes.

The November issue of the "International Labour Review" shows that unemployment is not so acute, the least improvement being shown in the United Kingdom. In European countries the improvement is general.

A committee has been formed to inquire whether a lower standard of living is an invariable result of a depreciated exchange.

The Labour office has published an important book classifying the Immigration laws of all countries.

British masters are praised for the manner in which they dealt with the white lead problem in the painting trade. Other matters dealt with by the fourth session were an agreement between France and Belgium regarding labourers, natives of the one country working in the other, and the condition of the Russian railways—forecasting that they will be utterly unable to cope with the autumn traffic in grain owing to the lack of fuel, trucks and engines. In spite of recent importations, 60 per cent. of the locomotives in the country are in an unworkable condition.

The Labour office has become an international clearing house for information. Inquiries have been received from Governments, employers' federations, labour unions and public institutions of every kind, and from individuals from 28 countries, including Australia.

An international committee has been appointed to study the conditions of agricultural labour.

The latest publication of the office is a report dealing with the steps taken throughout the world to cope with the unemployment problem.

"Internacia Scienca Revuo" has reappeared, with a full programme of activity in technical vocabulary work. Just what the relation of the "Internacia" is to the "Lingva Komitato" we have nowhere seen mentioned, but, of course, the work being done is under L. K. direction.

HERE AND THERE.

The "New York Times" has been giving a department of its Sunday issues to a discussion of the International Language Problem. The number of October 1 contains several articles exposing the errors of certain attacks, and pointing out the impossibility of both making a national speech an international one and conserving the tongue in its full idiomatic force and beauty.

Every reader of the "Suda Krucio" should order without delay the League of Nations report regarding the introduction of Esperanto into State schools, which is being distributed by the B. E. A., 17 Hart-street, London, W.C. 1, at 7d. per copy post paid.

GAZETOJ RICEVITAJ.

Amerika Esperantisto, nov.; Dia Regno, jan.; Esperanto Triumfonta, n-roj. 113, 114; France Esperanto, dec.; Katolika Mondo, n-ro. 6; La Progreso, nov.; La Interligilo, nov.; La Revuo Orienta, nov., dec.; Libero, okt.; Le Monde Esperantiste, sep.-okt.; Skandinava Esperantisto, okt., nov.; Sennacieca Revuo, dec.; Verda Utopio, nov.

TO EACH READER.

Please make an endeavour to get one new subscriber.

Use Form below.

ORDER FORM.

To the Secretary,

Esperanto Journal Committee,

Box 1367, Elizabeth St. P.O.,

Melbourne.

Please send me "La Suda Krucio" for 12 months, post free, commencing with.....issue, for which I enclose the sum of 4/6.

Name.....

Address.....

Books! Books! Books!

JUST what you have been waiting for. £50 worth of Books on hand at reasonable prices. Make your Christmas Present a Book, and let it be Esperanto Literature. The latest shipment includes:—

La Karavano, 2/-.
 La Vendetta, 2/2.
 Tra la Mondo, Vol I., 1/3.
 Vol. II., 2/-.
 Complete, 3/-.
 Tatterley, 1/3.
 La Faraono, 9/6; Comp., 3 Vol.
 Batalo de la Vivo, 1/3.
 Struvelpetro, 2/3.
 German Text Books, 2/-.
 German Dictionaries, 2/3.
 Pro Kio, 1/9.
 Kantistino, 1/3.
 Mirinda Amo, 3/9.
 Dua Elzercaro, 9d.
 Tri Angloj Alilande, 1/3.

Fundo de la Mizero, 1/6.
 Stranga Heredaĵo, 2/2.
 La Nigra Galero, 1/3.
 Hermano kaj Doroteo, 1/3.
 Kvin Noveloj, 2/-.
 La mirinda historio de Petro Schlemihl, 1/3.
 Nuntempaj Rakontoj, 1/3.
 Dictionaries—Fulcher and Long, 7/6
 Edinburgh, 2/-.
 Milledge, /6.
 Rhodes, 3/9.
 Esperanto Fountain Pen, 7/6.
 Esperanto Pencil Gift, 9/6, nickel,
 4/-.

ORDER NOW!

Send for Price List to Librarian,

Australian Esperanto Association

BOX 731, P.O. ELIZABETH STREET,
 MELBOURNE.

Cole's Book Arcade, Melbourne.

TWO MILLION BOOKS AND PIECES OF MUSIC.

— SEND FOR —

"THE RAINBOW," Cole's Monthly About Books. FREE TO YOU.

The House of Stead

STEAD'S REVIEW now appears in its improved new form with highly finished paper, perfectly printed, and a three-colour cover that will please the eye. We aim at continual improvement for it is to be a production worthy of presenting to Australians. Its price will remain the same.

Announcements.

During this year we will produce several New Magazines. Every one will be expertly cared for from the literary standpoint, and we are also determined to produce all our Magazines in high-grade form—good paper, good printing, and fine illustrations.

Fiction Magazine (Monthly).

Elevating and entertaining stories, good pictures and humorous drawings. Anecdotes by British, Australian and American Authors. Probable Price 9d.

Woman's Journal (Monthly).

All for Australian women. Matter will be treated by experts, and Magazine will be a production worth having and well worthy of Australians. It will be beautifully illustrated and will probably sell at 1/-.

Mountain and Seaside (Monthly).

For those contemplating a holiday, this Magazine will be guide, philosopher, and friend. Interesting place throughout Victoria will be written up and illustrated and full information given. Its pages will be strewn with good stories, sketches and humorous drawings.